# TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

**Volumo 49, Numero 6, Decembro 2016**


**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Lushnikov, Provleganto: Nicole Else**


## Zamenhof Festo 2016

La Zamenhof Festo 2016 okazis la 17an de decembro. La prezidanto de EFNSK Jonathan Cooper malfermis la feston kaj prelegis pri L.L.Zamenhof. Nicole Else preparis Esperanto-kvizon. Steven Garamy kiu venkis en la kvizo gajnis la bonan libron de Trevor Steele "Konvinka kamuflaĵo". Okazis ludoj preparitaj de Alan Turvey, prelegeto pri la projekto "Amikumu" de Richard Delamore kaj skajpumado kun japana E-klubo de Kofu. Poste ni havis lecionon por komencantoj kaj pican vesperon.






## JoMo en Sidnejo



JoMo (t. e. Jean-Marc LECLERCQ), franca kantisto kaj esperantisto, vizitos Sidnejon por unu semajno (15/01/17 – 22/01/17). Li havas tradician kaj rokan kantrepertuaron en 22 lingvoj, interalie Esperanto. Per tio li eniris en la Guinness-libron pri rekordoj.
Vendrede la 18an de januaro JoMo prezentos siajn kantojn ĉe Esperanto Domo. La renkontiĝo komenciĝos je la 6a ptm.
Sabate la 22an de januaro tagmeze ĉe Redfern Komuna Centro okazos koncerton de JoMo por ĝenerala publiko.

## Pri la Nova Kontlibrotenanto kaj Pagendaj Kotizoj

La Esperanto Federacio de NSK, post neŝanĝo dum multaj jaroj, altigis la membro-kotizon al $15 for individuo, kaj $20 por familio ĝis du plenkreskuloj kaj du geknaboj sub 18 jaroj. Espereble tio reflektiĝos per pli bonaj servoj. Bonvole informu la prezidanton pri kiel la Federacio povos helpi en via regiono.
Ni havas novan libro-tenanton, Joy Chapman, kiu ĝisdatigas nian Xero librotenadan sistemon. Ŝi sendis kotizo-petojn retpoŝte per la nova sistemo, kiujn vi eble ricevis. Kaj eble rimarkis ekajn

problemetojn por kiuj ni pardonpetas, tamen mi kredas ke aferoj pliboniĝos kaj, per la subkontraktado, certe la rolo de kasisto estos pli facila.

Ekzistas multaj eblecoj por pagi la jaran kotizon. La plej facila por la plejmulto estas iri al la retpaĝo ĉe http://esperantohouse.org.au kaj sub „About us“ elektu "Join".

Alie, vi povas sendi vian membro-kotizon rekte al La Esperanto Federacio de NSK BSB: 032-003 Konto numero: 337529 ĉe Westpac.

Alie, sendu ĉekon al La Kasisto c/o Esperanto Domo 143 Lawson St, Redfern, 2016. Bonvole informu nin pri viaj plej novaj kontaktadresoj.

Dankon se vi jam pagis. Estante membro de la Federacio vi helpas la Esperanto-movadon kaj en almenaŭ iu malgranda maniero vi kunigas diversajn Esperantistojn en nia ŝtato. Do, bonvolu renovigi baldaŭ.

## Nova Emblemo

La Esperanto Federacio de NSK havas novan emblemon. Tiu estis elektita el multaj desegnoj. Fakte, plurcent grafikistoj tra la mondo legis la laboropeton de nia asocio, pli ol tridek desegnoj estis finfine prezentitaj kaj la estraro voĉdonis por elekti la gajninton.

## Centra Marborba Lingva Festivalo




La 3an de decembro 2016 okazis lingva festivalo ĉe la Erina Centro. Jonathan Cooper salutis nome de la Aŭstralia Esperanto Asocio kaj la Federacio de Novsudkimrujo. Poste li prelegis pri konstruitaj lingvoj kaj Esperanto. Jo Turvey prelegis pri la korea, Alan Turvey prezentis japanan lingvon kaj Alan Libert prezentis Auxil. Ankaŭ okazis prelegoj pri kelkaj aliaj lingvoj kiel la nederlanda, la franca, la Kalasha, la hinda, la litova kaj la germana.







★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Manlia Esperanta Klubo ĉe Bavarian Beer Cafe, Manlia Kajo
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

EFNSW: Estraranoj: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato 11:00 ĝis 13:00
Por ĉiuj senpaga manĝeto, Esperanto Domo , Unua Dimanĉo de la monato 13:00 ĝis 15:00

La Meza Marborda Grupo; 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Paul Gorny (02) 9496 0395 Penny Vos (02) 6495 2922
Esperanto-Kafo-Klubo de Kanbero Jaŭde 17:00 la Pancake Parlour, 122 Alinga St.,Civic.
Huigh 02 6288 4334 *huighm@gmail.com*

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo: Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 14:00 – 16:00 *(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Lushnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |

Aliaj Estraranoj: Richard Delamore, John Casey